

Svisa federismo, 6-a parto
Claude Gacond, 158-a radioprelego, 1966.10.19 & 1966.10.22

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la svisa federismo kaj la provo federi Eŭropon.

Cl.- Pro la fermo de la monaĥejoj en la kanton Aargau eksterordinara konfederacia Dieto kunsidas en Berno en aprilo 1841. Ĉiuj rigardoj turniĝas al tiu ambasadora kongreso. Oni sin demandas, ĉu tiun ĉi fojon la konfederacia Ĉarto estos observata.

A.- Sed ĉiu interpretas tiun ĉarton laŭ siaj personaj gustoj kaj politikaj sintenoj. La simpatiantoj de la aargaŭa registaro nur volas vidi la unuan artikolon, kiu protektas la kantonan aŭtonomecon, kaj la klerikemuloj la dekduan artikolon, kiu garantias la ekzistadon de la monaĥejoj.

Cl.- Ŝajnas, ke la protestantaj ambasadoroj estus povintaj proponi sian arbitradon. Sed pro la ekscitiĝo klarvido ne plu ekzistas. Ĉiu estas blindigita de politika pasio.

A.- La ambasadoroj estis ricevintaj antaŭ sia forveturo al Berno striktajn ordonojn. La radikalaj registaroj estis ordonintaj proklami, ke « *la Dieto ne rajtas interveni por revenigi la monaĥojn en la aargaŭajn monaĥejojn, ĉar tiu interveno estus kontraŭa al la unua artikolo de la konfederacia Pakto, kiu garantias la suverenecon de la kantonoj. Se la Dieto intervenos en la internajn aferojn de la kanton Aargau, tiam la konfederacia Pakto estos atencata.* »

Cl.- La konservativaj registaroj estis ordonintaj aserti: « *La Dieto devas interveni por revenigi la monaĥojn en la aargaŭajn monaĥejojn, ĉar la dekdua artikolo de la federacia Pakto garantias la ekzistadon de la monaĥejoj. Se la Dieto ne intervenas, tiam estos atenco kontraŭ la Pakto.* »

A.- La hodiaŭaj internaciaj konferencoj kutimigis nin al tiu diplomata ĵargono de surduloj. Oni nur povas sin demandi, kial tiuj ambasadoroj grupiĝis en Berno. Verŝajne por konvinki sian internan publikan opinion pri la praveco de la vidpunkto de la kantona registaro.

Cl.- En 1843, tio estas du jaroj post tiu Dieta kunveno, en nova aparta Dieta renkonto la delegitoj de Lucerno, Uri, Schwyz, Unterwalden, Zug, Frejburgo, Valezo kaj ekstera Appenzell solene protestas, ĉar la registaro de Aarau ne nuligis sian decidon fermi la monaĥejojn.

A.- Tiuj delegitoj aparte renkontiĝis en Brunnen en la kanton Schwyz por starigi sekretan ligon kontraŭ la radikalaj registaroj. En tiu sekreta pakto ili antaŭvidis militpreparon kaj serĉon de apogo de ekstera potenco, kiel la Habsburga Imperio.

Cl.- La registaro de la kanton Lucerno serĉis metodon por malkontentigi la kontraŭklerikemulojn. Ĝi invitis la jezuitojn reveni en Lucernon. Jen denove fakto, kiu en paca tempo ne estus vekinta disputojn. En aliaj kantonoj la jezuitoj posedis famajn lernejojn. Ni menciuj Frejburgon, Schwyz kaj Valezon.

A.- En la kantonoj la spiritoj estis tiom ekcitantaj, ke nenia kontraŭregistara vidpunkto povis esti proklamata. La lucernanoj, kiuj devis voĉi por aŭ kontraŭ la alveno de la jezuitoj, fakte voĉis por aŭ kontraŭ la aĉa lando Aargau kaj por kolerigi la aargaŭan registaron venigis la jezuitojn.

Cl.- La radio hodiaŭ kutimigas al tiuj interregistaraj ŝakludoj. Ni eĉ facile aplaŭdas rebatojn al malamikaj politikistaj sistemoj. Tion farante ni forgesas, ke la peonoj ne estas lignaj ĉevaletoj kaj eburaj turoj sur ŝakludo, sed karnaj homoj senkulpaj.

Svisa federismo, 6-a parto
Claude Gacond, 158-a radioprelego, 1966.10.19 & 1966.10.22

A.- La radikalistoj ne povis interveni perleĝe. La federacia Pakto donis al ĉiu kantono absolutan religian kaj instruon liberecon. Ili trovis neleĝan rimedon, kiu estas tre simpla. Ili kreis volontularojn pretajn ataki la kantonon Lucerno.

Cl.- La federacia Dieto nur povis konstati la movojn de tiuj volontulaj armeoj. Ĝi petis la kantonajn registarojn ne oferi al ili armilojn kaj enirpermesojn. Tamen la registaroj armadis, nutris kaj helpis tiujn neoficialajn armeojn.

A.- Oni povas kompreni, ke en tiu klimato de militpreparo la lastaj alvokoj al paco kaj arbitrado estis silentigitaj far la alvokoj al venĝo. En la urboj kaj vilaĝoj la loĝantoj grupiĝis por aŭdi belajn patriotajn alvokojn.

Cl.- Kie radikala registaro regis, tiam oni pentris la jezuitojn kiel personigon de satano. Ŝajnis, ke en la konservativaj kantonoj la loĝantoj estis sklavoj liberigendaj.

A.- Same abstrakte oni parolis en la konservativaj kantonoj. « *La reformacio kondukis Svislandon al malbeno, nun la radikalismo neniigas la liberecon !* » asertis la ŝtatestroj, kaj ili daŭrigis : « *Se la katolikoj ne unuiĝas kaj ne venigas la jezuitojn, baldaŭ la protestantoj kondukos nin al paganismo.* »

Cl.- Hodiaŭ ni ridas pri tiuj asertoj, sed ĉiutage ni aŭdas kompareblajn asertojn pri liberaj kaj sklavaj popoloj, kiuj ankaŭ pretiĝas al interhoma buĉado.

A.- La 30-an de marto 1845 okazis la unua vera batalo en la kantono Lucerno. La radikala volontula armeo estis venkita. Ĝi lasis sur la batalkampo pli ol kvincent mortintojn kaj la lucerna armeo kaptis pli ol mil okcent soldatajn volontulojn, kiuj estis malliberigitaj.

Cl.- Kio ŝajnas ankoraŭ pli terura, tio estas la paroloj, kiujn oni recitis en la tombejoj. En ambaŭ grupoj ili estis la samaj. Mi citas du ekzemplojn : « *La volontuloj estas la esprimo de la plej alta moralo kaj de la plej bona popola spirito* » aŭ « *la mortintoj estas martiroj de la nacio.* »

A.- Subite en 1846 la sekreta aparta ligo estis oficiale proklamita okaze de sesio de la Frejburga parlamento. Ĝi grupigis 7 kantonojn kaj celis komunan defendon kontraŭ la atakoj de la radikalaj kantonoj. Ni tiam eniras pli altan ŝtupon en la militon. Tiu aparta ligo, en la germana **Sonderbund**, alportas fine ion, kio ankoraŭ mankis al la konflikto : nomo.

Cl.- La nomoj, se ili estas taŭge forĝitaj, movas la popolojn.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon !

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-